
## Saluton, SESanoj!

**El mia memoro. Rakonto, kiun mi legis japane en porinfana libro antaŭ 57 jaroj.**

Iam, ie estis brava kaj nobla reĝo kaj bela kaj gracia reĝino. Inter ili naskiĝis bela bebo. Tamen la bebo, reĝido, portis tre, ne, tro grandan nazon. La malĝojaj gereĝoj invitis sorĉistinon, kaj petis ŝin malgrandigi la nazon de ilia filo. La sorĉistino sorĉis la bebon kaj antaŭdiris, " Kiam la princo mem deziros malpli grandan nazon elkore, tiam la nazo fariĝos malpli granda."



La reĝo kaj reĝino venigis el la tuta lando gevirojn kun granda nazo kiel nutristinojn kaj servistojn por la reĝido. La reĝido kreskis nutrate kaj servate nur de la grandnazuloj. Knaboj kaj knabinoj kun granda nazo ankaŭ estis elektitaj el ĉiuj geknaboj en la lando kiel liaj geamikoj.

Kiam li fariĝis kreskinta junulo, li ekamis belan kaj ĉarman princinon. Li konfesis sian amon, kaj petis manon al ŝi. La princino akceptis lian proponon kaj konsentis fariĝi la estonta reĝino. La reĝido ĝojis kaj brakumis ŝin. Li estis kisonta ŝin. Sed tamen li ne povis tuŝi ŝiajn lipojn per siaj lipoj malhelpate de la nazo. Li malamis la nazon unuafoje en la vivo, kaj deziris anstataŭigi ĝin per malpli granda nazo elkore. Li lamentis en la koro, " Se mia nazo estus malpli granda, mi povus kisi ŝin!" Ĝuste en tiu momento lia nazo malpligrandiĝis.

Kirikae H.